

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Sonorilo

54-a jaro - n° 4

Junio - Julio - Aùgusto 1962

Demandu provveturon per
la nova

Ford Anglia

LA PLEJ BRILA EN SIA KATEGORIO



rekta distribuanto por Brugge kaj
ĉirkaŭaĵoj

GARAGE CANADA

GULDEN VLIESLAAN 68 BRUGGE

TEL. 34611

Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

REDAKCIO : JAUMOTTE MAURICE
ROOSE FERNAND, SINT-KLARAÐREEF 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81
MAERTENS GRÉGOIRE

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :


DR. POL DENOËL
BRUNO DENOËL

ISERENTANT ROGER
POUPEYE CHARLES

COUWENBERG F.
DE CUYPER GEORGES
DE MARRÉ LUC

ADMINISTRADO :

TERRYN J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO
DE BRUYNLAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 37758

HONORA PREZIDANTO

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTO

SELENS HENRI

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD
JAUMOTTE MAURICE

ĜENERALA SEKRETARIO

DE MARRÉ LUC, GROENENDAALLAAN 232, ANTWERPEN TEL. (03) 411912

SEKRETARIO POR LA FLANDRALINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS TEL. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

DE CUYPER GEORGES, 44 RUE DU TEMPLE, COURCELLES (HAINAUT)

KASISTINOJ

TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT
PORKONGRESA : PLYSON J. 24, PLACQ E. FLAGÉY, BRUSELO 5 P.K. 236804

REPREZENTANTO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

COUWENBERG F., KONINGINNELAAN 14, BLANKENBERGE
P.K. NR 416135

POŝTKONTOJ DE B.E.F. :

DE LA ANTAŬA R.B.L.E. : 1337.67 WILRIJK

FLANDRA LIGO : 2321.50 GENT

LA BENELUKSA KONGRESO 1963

post dek jaroj ree en Antverpeno

Forpasis la jusa Beneluksa Kongreso, kiu okazis en Hago.

La unua tia Kongreso okazis antaŭ naŭ jaroj (en 1960 tamen ne estis Kongreso, pro la U.K. organizita en Bruselo) kaj, proksiman jaron, do, dek jaroj estos forpasintaj ekde tiu granda, multnombre ĉeestita kaj senegala 1-a Beneluksa Kongreso, en Antverpeno.

Ni diras *senegala*, unuavice, ĉar regis tiam vere varmega, "senegala" temperaturo, kiu preskaŭ malebligis promenadon kaj iĝis multajn preskaŭ daŭre sidadi ĉe teraso de kafejo, kun freŝa bicero aŭ glaciaĵo. Ni diras "sen-egala" ankaŭ, ĉar efektive la sekvontaj Kongresoj neniam plu kunigis tiom da partoprenantoj, kiel tiu unua, por kiu veturis al nia havenurbo, pli ol tricent kongresanoj.

La administrantaro de Belga Esperanto-Federacio opinias, ke estos, verŝajne por multaj, agrable reiri, — post tiuj dek jaroj, — al la urbo, en kiu nia movado kalkulas gravan helpantaron, kiu montriĝas ĉiam preta ion entrepreni por la bono de nia movado.

Kaj la Antverpenanoj akceptis... Kaj tuj letero foriris al la estraro de L.E.E.N., la Nederlanda asocio, por peti ties akordiĝon pri la elekto de tiu ĉi urbo.

La kotizo por la lasta Kongreso en Belgujo estis Fr. 60, dum tiu de la jusokazinta kongreso altiĝis je Fl. 10 aŭ Fr. 140 por la unua periodo; al Fr. 150 eĉ, por ni dum la lasta.

La organizontoj kaj la administrantaro de B.E.F. decidis fiksi la kotizon je Fr. 100 kaj fari eĉ *rabaton de 25 %* por la familianoj-enloĝantoj kaj por la individue aliĝontaj gejunuloj, malpli ol 21-jaraj.

Tuj, en Hago jam, — kaj kvankam la belga ĉeestantaro ne estis tiel grava kiel kutime, pro la fakto ke la reorganizo de nia movado, tiun ĉi jaron, ne lasis al la estraro la tempon ankaŭ bone kaj ĝustatempe prizorgi la propagandon necesan por Kongreso —, jam enskribiĝis en la *Honoran Kolonon* por la jubilea "Beneluksa Kongreso 1963" multaj samideanoj, kiuj ĉiuj pagis sian kotizon surloke.

Por faciligi al la organizantoj sian laboron, ni petas ke ĉiuj, kiel eble plej baldaŭ, — *kaj kial ne TUJ?* —, havigu sian kotizon al sia grupa kasisto.

La izolaj membroj aŭ tiuj, kiuj ne regule ĉeestas grupan kunsidon, povas ĝin ankaŭ pagi al la porkongresa kasistino S-ino Julia Plyson, 24, Placo Eug. Flagey, Bruselo 5; P.C. N° 23.68.04.

La organizontoj, kiuj publikigos la kunmeton de la L.K.K. en la proksima numero de nia revuo, antaŭdankas!

B.E.F.

RAPORTO PRI FORPASINTA KONGRESO APEROS
EN LA PROKSIMA NUMERO DE "SONORILO"

NI PREPARU NIAN AUTUNAN LABORON

Antaŭ ses monatoj kunfandiĝis la du ĝisnunaj Ligoj. Jam de ses monatoj ekvivas Belga Esperanto-Federacio. Kaj dum tiuj ses monatoj la gvidantoj solvis la plej tujajn problemojn, kiujn tia kunfandiĝo neeviteble antaŭmetas al tiuj, kiuj konceptis kaj efektivigis ĝin.

Post ses monatoj, ni rajtas fieri, ĉar la plej gravaj internaj problemoj estas jam solvitaj. Ni tamen ne forgesu, ke la reunuiĝo estis nur rimedo por ebligi pli vastan eklaboron: unuflanke, dank' alla fakto ke la ĝis tiam disaj fortoj eklaboras nun en ordigita kaj kunigita vico; sed aliflanke, — kaj eble precipe —, ĉar nun la nova organizaĵo povas paroli ĉie, organizi ĉion kaj sin direkti al kiu ajn instanco, kiel la nediskutebla reprezentanto de la nacia movado.

Tial la estraro de B.E.F., dum tiu unua duonjaro, ne kontentiĝis solvi tiujn problemojn internajn, plej ofte nur administrajn. Ĝi dediĉis sian tutan lastan kunsidon al la preparo de la proksim-aŭtuna propagando, kiu devas antaŭiri la malfermon de la elementaj kursoj en ĉiuj urboj, kie ni havas grupojn.

Por ke tiu propagando estu efika, ĝi nepre devos sin apogi sur sufiĉe gravaj propagandaj rimedoj, kiuj ne ekzistas ĝis nun aŭ kiuj, — se ili jam ekzistis —, tamen iĝis intertempe elmodaj, laŭŝajne arkaikaj, ĉiukaze ne plu taŭgaj por voki la atenton de la amaso.

Kaj la estraro do decidis dediĉi parton de la mono, kiun la gvidantoj de la du antaŭaj Ligoj, — dank'al komuna streĉa laboro, — akiris per la organizo, en 1960, de la 45a Universala Kongreso, en Bruselo, al la akiro de tiuj rimedoj.

La profito de tiu Kongreso, laŭstatute dividita inter U.E.A. kaj ni, nun estos la bazo de nia estonta laboro. Ĝi permesos al ni presigi informilojn kaj propagandilojn, havigi al niaj paroladistoj, propagandistoj kaj grupoj materialon nepre necesan, en epoko kiam nur la kombinita utiligo de la okulo kaj de la orelo kapablas vekti la interesiĝon de la granda publiko.

Sed, en tiu ĉi momento, kiam B.E.F. do elspozos parton de sia havaĵo, por meti je la dispono de ĉiu, kiu bezonos, tiun nepre necesan ilaron, ni solene alvokas ĉiujn, kiuj havas respondecon en la landa aŭ loka movado: *Ili zorgu ke la enmetita mono ne estu perdita mono.*

Se ni posedos ekspozician materialon, diapozitivojn kaj sonbendojn kaj aparatojn diversspecajn, ne estas, kaj ne povas esti, por ke ili kuŝadu ie en ŝranko. Daŭra utiligo de kiu ajn materialo ja kondukas al foruzo, al uzkonsumo... Ni tamen pripensu ke ankaŭ ne-uzo havas la saman kaj preskaŭ same rapidan efikon. Ni do prefere ja utiligu ĉion! Ni faros tiel servon al la movado... Ni faros tiel servon ankaŭ al ni mem. Ĉar tio, kion ni ĵus diris pri materialo, estas ankaŭ vera por ni, homoj, kaj por nia korpo.

Ankaŭ tiu ĉi prefere eluziĝu per laboro, speciale per tiu laboro, libere konsentita, kiun ni dediĉas al nia movado. Ĝi ne eluziĝu pro malstreĉiĝo, pro facilema ripozo... kiu tro rapide iĝas eterna ripozo!

Por vi, por ni, por nia movado, ĉiu vekigi, ĉiu ekstaru, ĉiu eklaboru!

Maurice Jaumotte.

Firma Van Iseghem & Verstraeten,

P.V.B.A.

ST BERNARDSE STEENWEG, 631 HOBOKEN

VITRALOJ - SPEGULOJ - „SECURIT” VITRO
KOLORIGITAJ VITROJ
ALUMINIAJ SENMASTIKAJ STANGOJ POR
KUPOLOJ

VITRO-CEMENTO POR TUTVITRA-KONSTRUJAŬOJ
MASTIKO

telefono 37.88.20

ANONCO

Esperanta grupeto de elementa lernejo en Celje deziras korespondi kun samaĝuloj (ĉirkaŭ 14 jaroj). Proponojn sendu al gvidantino S-ino Mara Pogaĉnik — ul. 29. Novembra 5 — Celje (Jugoslavia).

14-jaraj lernantinoj: Cvetka Mlakar — Smrekarjeva ul. 6 — Celje kaj Simoniĉ Dunja — Zidanškova ul. 13 — Celje (Jugoslavo) deziras korespondi.

David W.M. Jenkins, Apartment 62, 76 Eglinton Avenue, ast, Toronto, 12, Canada, diplomita kontisto, deziras korespondi pri lingvoj, religioj, mondaferoj k.t.p.

Aŭdaj kaj vidaj instrurimedoj

Ĉiuj kiuj naskiĝis komenciĝe de la nuna jarcento kaj ĉeestis, ek de siaj infanaj jaroj, la miregindan elkreskadon de rimedoj por komunikado kaj diskonigo de la pensoj, tiun ĉefan karakterizaĵon de nia epoko, ne jam elmiriĝis fronte al tiu teknika progresado, kies finiĝo ne estas ekvidebla.

Dum la jaroj antaŭ 1914, la lingvo, parola kaj skriba, konservis nekontesteblan superecon: la voĉo estis transsendebla nur per la telefono, tiam ankoraŭ malmulte disvastigita; la parolanto apudestis al sia aŭdantaro; la fonografo kun trumpetkonko kaj cilindroj nur malmultajn hejmojn gajnis; la libro, mezbone ilustrita per gravuraĵoj, desegnaĵoj aŭ iom mizeraj fotografiaĵoj, regis senkonkurence; la skribaĵo apenaŭ disvastiĝis kaj la fotografarto estis proprajo de profesiuloj.

Hodiaŭ aspektas tute alie. De nun informado penetras ĉien kaj preskaŭ tuje, per multobligitaj rimedoj, kiuj utiligas ĉiujn povrimedojn de konstante evoluanta tekniko kaj kiuj, por tiel diri, devigas la atenton de la legantoj, vidantoj kaj aŭdantoj.

Tra la tuta mondo, kolektive en spektaklejoj, en aŭskultejoj, individue en la familia aŭ socia hejmo, en la izoleco de la persona ĉambro, je ĉiu momento de la tago aŭ de la nokto, tiuj kiuj deziras nun povas kontakti kun aĵoj kaj faktoj, kun ideoj kaj homoj.

... Kiu ne posedas sian fotografilon kaj ĝian nemalhaveblan kompletilon, la projekciilon kaj ĝian ekranon? Pli kaj pli aldoniĝas la kamero, donanta al la presita kaj kolora memoraĵo la neforgeseblan vivantecon de la movo. La kampo de la permana skribo reduktiĝas pro la triumfanta invado de la skrib- kaj kalkulmaŝinoj, de la teletipo, de la bilda dokumento kiu akaparos la spacon, lasante al la teksto nur lokon por mallonga kaj nesufiĉa komentario.

Sur la kampo de la parolo kaj de la sono, sama invado de la meĥanikaj kaj elektraj rimedoj por registrado, reproduktado kaj konservado: fonografo, radio, telefonaj kaj radiotelefonaj elsendiloj-riceviloj, registriiloj-reproduktiiloj-konserviloj sur magnetaj bendoj, se eĉ ambaŭ faktoroj: bildo kaj sono, ne kombiniĝas kiel en parolanta filmo kaj televido.

... La homo ne nur trudiĝe akceptas la estrigon de tiuj rimedoj en la publikaj lokoj, kie ili estas uzataj, sed eĉ en la intimeco de sia ĉambro aŭ de sia hejmo, ĝi nur tre malforte povas reagi kontraŭ tiuj influoj.

Tiu homo fine toleras specon de sklaveco, kiu ĝin devigas reiri regule al la ensorĉo de ĝia aparato. Tiu homo akceptas la nutraĵon al ĝi servitan, kun ingrediencoj kaj aranĝoj entenataj, kelkfoje akompanatan per ensorĉiga muziko.


... Nur la projekcioj de diapozitivoj aŭ de objektoj per la helpo de projekcioj aŭ de epidiaskepoj, ebligas ĉiumomente la nemalhaveblan intervenon de la instruisto. ... Mi kompreneble ne parolas pri la diskoj kaj magnetofonoj, nek pri la radio- aŭ televidelsendoj, pri teatro aŭ muziko, nek ankaŭ pri la uzo de tiuj rimedoj por la instruado de la lingvoj kaj de la korekta elparolado. Ĉio tio estas nepridiskuteble utila.

Ĝis tie la traduko de kelkaj alineoj el tiu vere *pensiga* artikolo. La aŭtoro, *Professoro Félix Peeters*, konkludas asertante ke, se tute certe oni devos meti ĉiujn tiujn modernajn rimedojn je la dispono de la instruado, tamen oni neniam povos malhavi tiun devigan peranton: la instruiston!

Por ni, Esperantistoj, ne estas speciale tiu konkludo, kiu interesas nin. Sed tio kio pli frapas estas, ke post resumigo de ĉiuj tiuj aŭdaj kaj vidaj instrurimedoj, ni devas konscii ke, kun niaj ĝisnunaj metodoj por propagandi kaj instruadi Esperanton ni vere malfruas de almenaŭ duonjarcento!

Estus fruktodona laboro esplori la eblajn rimedojn al tiu iom hontiga situacio. Ni tion volonte farus kun la helpo de niaj legantoj kaj tial ni petas ke ili bonvolu komuniki tiurilate siajn pensojn, projektojn kaj precipe siajn eblajn spertojn.

Ŝa Pu Pej



PIEDBŒUF uzas Esperanton

La Komuna Merkato plioftigos la internaciajn kontaktojn Ĉiuj antaŭvidemaj entreprenoj sin preparas, tiel ankaŭ "Piedbœuf", la pej granda bierfarejo de Valonlando. Ĝia situo en la triangula kaj tridiverslingva parto de la lando, kontribuos ankoraŭ pli al tiu kontakto.

Gvidataj vizitoj kaj senpaga gustumado de la produktoj estos organizataj ek de la 15 de Majo. Konseca, pri la diverslingveco de la vizitontoj, la Direkcio de la bierfarejo Piedbœuf konsekvence akceptis ankaŭ Esperanton apud la aliaj lingvoj parolataj en la landoj de la Komuna Merkato. Ĝi tiucele dungis Esperantiston kiel interpretiston, kiu ekskluzive gvidos la vizitontojn.

Gvidataj vizitoj en Esperanto estos eblaj ĉiutage (escepte lundon antaŭtagmeze, dimanĉe kaj sabate) je la 9a aŭ la 14a horo por grupoj de 10 ĝis 40 personoj. Unuopuloj estas tamen ankaŭ bovenaj sed ili devos partopreni kun alia grupo.

Interesatoj por viziti la bierfarejon skribu al Chef du Département "Public Relations" Brasserie Piedbœuf Jupile por demandi la viziton kaj fiksi la daton. Nepre indiku la nombron de la vizitontoj kaj nur skribu kiam temas pri vizitdemando aŭ koncernaj informoj.

La unua internacia konferenco esperanta de sciencistoj

paul neergaard

ORGANISATE DE LA NUA INTERNACIA KONFERENCO
ESPERANTO DE SCIENCISTOJ
VICPREZIDANTO DE SCIENTA ASOCIO ESPERANTISTA,
PREZIDANTO DE IKK DE LA 47-A UNIVERSALA
KONGRESO DE ESPERANTO

La lingva problemo en la scienco estos la temo de speciala konferenco de esperantistaj sciencistoj, kiu laŭ ĵus farita decido sekve de interkonsento inter Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Scienta Asocio Esperantista okazos paralele al la 47-universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago.

Ne estas necese atentigi al la esperantistaro pri la eksterordinara graveco de tiu ĉi decido. La lingva problemo en la scienco estas premege. La diverseco de lingvoj forrabas tempon kaj energion, perdigas milope eblojn de kontaktoj, lasas oftege neatentitaj sciencajn atingojn de neprevilegiitaj lingvoregionoj, malfaciligas rektan interŝanĝon de pensoj en internaciaj sciencaj konferencoj kaj kongresoj, kreas malklarecon, kie devus esti klareco — situacio katasrofe malkonforma al la spirito de la scienco, al la principa efikeco de ĝiaj labormetodoj.

En Kopenhago oni dediĉos seriozan studadon al tiu ĉi problemo, kaj ni nun alvokas al ĉiuj esperantaj organizaĵoj kaj gazetoj kunlabori por diskonigi tiujn ĉi urĝajn informojn pri la okazigo de la konferenco. Al tiu ĉi konferenco estas kore invitataj ĉiuj sciencistoj, kiuj povas kaj volas serioze kontribui al la laboroj de la konferenco. Koncize la plano esta la jena.

La konferenco estas, kiel menciite, malfermita al ĉiuj sciencistoj, kiuj iel povas kontribui. Aliflanke, la laborkunsidoj de la konferenco estas — kiel ĝenerale estas tiaj sciencaj laborkonferencoj — fermitaj al nesciencistoj, nefakuloj. Ĉi tio tamen ne malebligas, ke speciale interesiĝantaj nefakuloj per antaŭa peto povas ricevi permeson ĉeesti kiel observantoj.

La konferenco konsistos el du partoj, sekve de la kunlaboro kun U.E.A. La unua parto estos la prelegoj de la Internacia Somera Universitato, kiuj ĉi-jare direktiĝos al temoj rilatantaj al la celo de la konferenco, studo pri la lingva problemo en la scienco. Ili pritraktos tiun temon el la vidpunktoj de la diversaj fakoj, ne detaliĝante pri ĝeneralaĵoj jam bone konataj (ekz. ĝenerale prisciataj lingvaj malfacilaĵoj ĉe internaciaj konferencoj ktp.), sed koncentriĝante pri specifika lingvaj problemoj de la unuopaj sciencoj puraj kaj aplikataj. Ĉiuj prelegoj estos pretigitaj manuskripte, kaj la tuta materialo formos gravan parton diskutotan en la laborkunsidoj de la konferenco.

Alia parto de la studota materialo formiĝos per kontribuajoj preparitaj antaŭ la konferenco de sciencistoj-specialistoj. Pro la atendata amplekso de la materialo kaj la limigita tempo disponebla por la diskutado, tiuj kontribuajoj devas aperi en formo de mallongaj traktajoj.

pli malpli kiel resumoj, tamen, se necese por la dokumentado, akompanataj de tabeloj, grafikajoj k.s. Tiuj kontribuajoj devas esti senditaj al Kopenhago antaŭ la konferenco, ĝis plej malfrue la 15-a de junio, por povi esti multobligitaj kiel provizora raporto disdonota al la konferencanoj por pristudado.

La tuta materialo tiel kolektita estos diskutata en la laborkunsidoj de la konferenco. Ĉiuj prelegoj de la Internacia Somera Universitato okazos antaŭ jaŭdo de la kongresa semajno, la unuaj kunsidoj de la konferenco mem okazos versaĵne dum la tuta jaŭdo, plue dum kelkaj horoj de vendredo kaj la konkludiga kunsido sabaton posttagmeze.

Kiel ĉefa organizanto de la konferenco mi alvokas, mi ripetas, la kunlaboremom de esperantaj organizaĵoj kaj gazetoj, ke ili bonvolu senprokraste diskonigi la supre donitajn vere urgajn informojn pri la konferenco. Kaj en la nomo de Internacia Scienca Asocio Esperantista mi tutkore invitas sciencistojn esperantistajn kaj neesperantistajn partopreni en la studoj antaŭ la konferenco kaj en la konferenco mem. Ĉiuj, kiuj emas kunlabori kaj partopreni estas petataj skribi al la 47-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, per *aparta* letero temanta *nur* pri la aferoj de la konferenco kaj kun la jena indiko sur la koverto: *Scienca Konferenco*. Ili sciigu la eventualan precizan temon (kun ioma indiko pri la enhavo de la kontribuajo), kiun ili proponas por pritrakto en la konferenco.

La tuta materialo de la konferenco, la prelegoj, la ceteraj kontribuajoj kaj la referatoj de la diskutoj, estos kompilitaj en granda raporto, supozeble multobligita kun presita kovrilo, kiu estos publikigita per kunlaboro inter la Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj la Centro de Esploroj kaj Dokumentado, Londono. Supozeble la raporto aperos ankaŭ nacilingve.



ko de 2 Kčs — bildo: Nova Hut, Ostrava Kunčice — surhavas kiel duan surskribon la svedan lingvon laŭ la informo de tiu revuo. Certe nur tiuj svedoj komprenas la duan surskribon, kiuj scipovas Esperanton. Ĉar ĝi tekstas: TUTMONDA EKSPONIZIO DE POŠTARKOJ.

(El Germana Esperanto revuo.)

Pri I.S.A.E.

La progreso de Esperanto nepre dependas de la aplikoj en kelkaj kampoj de la homaj interrilatoj kiel: la komerco, la turismo, la religio, la scienco... En la nuna tempo oni multe celas algrupigi tiujn personojn, kiuj havas la samajn profesiojn, interesojn, flankokupojn ktp, en la t.n. fakorganizaĵojn por tiamaniere vekti la praktikajn aplikojn de Esperanto.

Unu el la plej malnovaj de tiaj organizaĵoj estas la Internacia Scienca Asocio Esperantista (I.S.A.E.), kiu celas la progreson de Esperanto en kaj per la scienco. Ĝi starigis jam en 1906a kaj daŭre efike laboris.

En la lastaj jaroj I.S.A.E. spertis senteblian krizon, speciale pro la neregula aperado de ĝia organo "Scienca Revuo". La afero tamen nun enordigis, la revuo denove regule aperos kaj I.S.A.E. nun estas aranĝita laŭ nova sistemo, kiu estas promesplena kaj kiu garantias kontentiĝon de la membroj. Ankaŭ plurfoje aperas nun "Bulteno" kiu enhavas la sciindaĵojn por la membroj de I.S.A.E. kaj de ĝiaj parencaj organizaĵoj.

La nuna prezidanto estas Prof. W.E. Collinson de la Universitato de Liverpool, kaj la ĝenerala sekretario estas Prof. B. Popović de la Universitato de Sarajevo.

En Belgujo nun ankaŭ estas definitiva reprezentanto: S-ro W. De Smet, Graaf van Egmontstraat 16, Antverpeno, P.C. 42.23.98. Li anigas la novajn membrojn, enkasigas la kotizojn, peras por la parencaj organizaĵoj, kiuj ne havas reprezentanton en Belgujo, donas informojn pri tiuj aferoj, k.t.p.

La kotizo de I.S.A.E. (inkluzive de la ricevo de la "Bulteno") estas 35 Fr. La abono al "Scienca Revuo" estas 85 Fr. por la membroj, 105 Fr. por la ne-membroj.

Ni menciuj unu specialan aktivajon de I.S.A.E. en ĉi tiu jaro: paralele kun la 47-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, de la 4a ĝis la 11a de Aŭgusto 1962a, okazos le unua Internacia Konferenco Esperanta de Sciencistoj. Informoj pri ĝi aperas en la Esperanto-revuo kaj estas haveblaj ĉe la landaj reprezentantoj de I.S.A.E.

Parencaj organizaĵoj de I.S.A.E. estas jenaj: *Universala Medicina Esperanto-Asocio (U.M.E.A.)* grupigas kuracistojn, farmaciistojn, bestkuracistojn, dentistojn, flegistojn, membrojn de ĉiuj medicinrilatantaj fakoj kaj studentojn de tiuj fakoj.

La organo estas "Medicina Revuo". La organizaĵo konsilas al siaj membroj persone aliĝi al I.S.A.E.

Abono: 85 Fr. Kotizo kaj abono: 100 Fr.

Speciala reprezentanto por Belgujo: D-ro P. Denoël, 20 rue Victor Raskin, Lieĝo.

Internacia Geografia Asocio (I.G.A.) eldonas belegan revuon: "Geografia Revuo" kaj propran bultenon por la membroj.

Kotizo: 28 Fr. Abono al kvar sinsekvaj numeroj de la revuo: 56 Fr. Speciala reprezentanto por Belgujo: S-ro R. Behaeghel, Twijnstraat, 5. Bruĝo.

Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj (I.A.J.E.), kolektive aliĝas al I.S.A.E.

Kotizo: 50 Fr. Personoj kiuj deziras individuan aliĝon al I.S.A.E. krome pagas 35 Fr.

Internacia Societo de Arkitektoj kaj Konstruistoj Esperantistoj (I.S.A.K.E.) estas por arkitektoj, konstruaj inĝenieroj, konstruistoj. La societo eldonas specialan "Oficialan Informilon".

Kotizo: 70 Fr., kiu enhavas la aliĝon al I.S.A.E.

Studenta Tutmonda Esperantista Ligo (S.T.E.L.O.), akceptas kiel membrojn tiujn, kiuj studas aŭ studis ĝis antaŭ ĉiuj jaroj en iu universitato aŭ samnivela altlernejo. Ĉi estas kvazaŭ junular-sekcio de I.S.A.E. kaj donas specialajn avantaĝojn rilate I.S.A.E.-n al siaj anoj. La propra revuo "Studento" ne plu aperas, sed la revuo de la Brita Junularo "Kial ne?" disponigas kelkajn paĝojn de kelkaj numeroj al la rubriko de S.T.E.L.O.

Kotizo: 18 Fr. Abono al a S.T.E.L.O.-numeroj de "Kial ne?": 28 Fr. Kompleta abono: 40 Fr.

Aliĝo al I.S.A.E. por S.T.E.L.O.-anoj: 18 Fr. Abono al "Scienca Revuo": 50 Fr.

Reprezentanto por Belgujo: W. De Smet, reprezentanto de I.S.A.E.

Internacia Elektrista Asocio (I.E.A.), preparita kaj jam parte ekzistanta aliĝas ĉiujn, kiuj havas intereson pri elektrotekniko.

Ornitologia Rondo Esperantlingva (O.R.E.) ankaŭ estas en prepara stato kaj aliĝas tiujn, kiuj havas interesojn pri birdoj.

Internacia Studrondo Geodezia (I.S.G.), kvankam jam ekzistanta de kelkaj jaroj, ankoraŭ bezonas plian evoluon.

Planoj ekzistas por la starigo de fakrondoj aŭ veraj organizaĵoj de veterinaroj, matematikistoj, astronomiistoj, lingvisikistoj... Esperinde ĉiuj tiuj organizaĵoj vencas sub la komunan tegmenton kiun celas esti I.S.A.E.

La aliĝo de interesiĝintoj nepre estas necesa!

HET WELGEKENDĖ
MAGAZIÏN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREDĖ KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BRĖKEN
UNIFORMEN - GABARDINEN - LODĖNS
STYLVOLĖ MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

47-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kopenhago, 4 - 11 Aŭgusto 1962

OFICIALA KOMUNIKO

Fervojaj Rabatoj. Kiel pli frue anoncite, la Dana Fervojo donas rabaton de 35 % al kongresanoj aĉetantaj revenbileton. Krom ĝi ankaŭ la jenaj Fervojoj donas rabaton:

| | | | | |
|---------|-----|-----|-----|------|
| Sveda | ... | ... | ... | 35 % |
| Norvega | ... | ... | ... | 25 % |
| Hispana | ... | ... | ... | 25 % |
| Hungara | ... | ... | ... | 25 % |
| Franca | ... | ... | ... | 20 % |

Karavanoj. Anoncis karavanon:

S-ro Joel Vilkki, Somero, Finnlando;

Brita Esp.-Asocio, 140 Holland Park Avenue, London W.11, Anglujo;

I.E.F., S-ro G. Grattapaglia, Via Pallanza 32, Torino, Italujo;

S-ro J. Telling, Schietbaanlaan 160a, Rotterdam, Nederlando.

Internacia Prelegsemajno. De la 11-a ĝis la 18-a de aŭgusto okazos en Frostavallen, Svedujo, Internacia Prelegsemajno. Detalajn informojn donas S-ro J. Str nne, Amiralsgatan 36, Malm -C., Svedujo.

I.S.U. La ĝenerala temo de la ĉijara Internacia Somera Universitato estas: "La lingva problemo en la scienco". Por prelegoj proponis sin: Prof. D-ro I. Lapenna, "La lingva problemo en internaciaj rilatoj, en kompara kaj internacia juro";

S-ro C. Stop-Bowitz, "Kiel nomi la organismojn?";

Prof. G. Waringhien, "La ellaborado de Esperanta leksikologio";

D-ro Paul Neergaard, "Problemoj de lingva unueco en la biologiaj kaj agronomiaj sciencoj";

Prof. D-ro Hideo Yagi, "Valoro de Esperanto por Internacia evoluo de medicino";

Prof. D-ro Inĝ. Zbigniew Nowak, "Provo de formulado de la esencaj leĝoj de l'mekaniko en Esperanto".

Statistiko (ĝis fino de marto): Arabujo 1, Argentino 3, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 6, Belgujo 15, Brazilo 4, Britujo 111, Bulgarujo 12, Danlando 185, Finnlando 38, Francujo 82, Germanujo 105, Grekujo 2, Hispanujo 8, Hungarujo 6, Irlando 1, Islando 2, Israelo 3, Italujo 43, Japanujo 9, Jugoslavio 27, Kanado 1, Libano 1, Madagaskaro 1, Meksikio 3, Monako 2, Nederlando 83, Norvegujo 9, Nov-Zelando 1, Pollando 16, Portugalujo 7, Svedujo 126, Svisujo 15, Usono 14, Entute 943 el 34 landoj.

G. G. Pompilio.

Niaj Universalaj Kongresoj

Niaj legantoj jam ĉiuj scias, ke la proksima Universalaj Kongreso okazos, dum aŭgusto, en la ĉefurbo de Danlando: Kopenhago.

La sekvontaj Universalaj Kongresoj okazos:

en 1963: en Sofio (Bulgarujo)

en 1964: en Hago (Nederlando)

en 1965: en Tokio (Japanujo)

La « Supera Pedagogia Lernejo » de Liego, postlerneja perfektiga instituto por geinstruistoj, enmetis ĉi-jare en sia programo unu prelegon pri Esperanto.

Tiu prelego lokita en la rubriko « la modernaj instrumetodoj », okazis la 23-an de Majo.

D-ro Pol Denoël, vicprezidanto de Belga Esperanto-Federacio, estis komisiita fari tiun prelegon, por kiu tri horoj estis rezervataj.

La prelego enhavis kvar punktojn:

1-e la lingvaj karakterizoj de Esperanto, 2-e la pedagogia valoro de la L.I. (post la elmonro de morala aspekto kaj ĝia praktika valoro, oni insistas pri la senkompara helpo de Esperanto por la intelekta formado de la lernantoj kaj por pli bona kono de la nacia lingvo), 3-e la aparta pedagogio en la instruado de la L.I., 4-e la nuna situacio de « Esperanto en la lernejoj » kaj la altvaloraj atingajoj de « Graĵoj en Vento ».

Sekvis projekciado kaj komentariado de du kolorfilmoj, kunmetitaj de la preleginto: 1-e la 44-a U.K. en Varsovio, 2-e pri la Esperanta Gramatiko (jam projekciita dum 44-a U.K.).

Tiuj filmoj kaj la prelego tre interesis la aŭskultantaron, kio respeguliĝis en la multaj demandoj al la preleginto.

Inspektoro de popollernejoj Iris Fays, kiu prezidis la kunsidon, proponis ke D-ro Denoël gvidu Esperantan kurson en la Lernejo ekde venonta septembro kaj promesis mem studi la L.I.

Tiu promeso ne estis vana, ĉar post kelkaj tagoj la inspektoro petis lernolibrojn kaj vortaron.

LA SAĜA BELULINO

Unufoje iris laŭ sia vojo la bela virino.

Malantaŭe iris iu viro, kaj longtempe senĉese sekvis ŝin.

Tiam la belulino sin turnis kaj demandis lin:

“ Kial, por kio vi persekutas min, malkonatulo? ”

“ Mi ekamis vin, plej bela el la belulinoj? ”

La virino ridetis kaj parolis: “ Malantaŭ mi iras mia fratino. Ŝiaj okuloj estas nigraj kiel la nokta ĉielo. Ŝi estas multe pli bela ol mi, dekoble. ”

La viro ekĝojis kaj ekkuris reen.

Li kuris, kuradis kaj vidis: malrapide, lame iras laŭ vojo maljuna, maljunega tre malbela virino.

Li eĉ kraĉis ĉagrene kaj kolere kuregis returne piedsigne, por kuratingi la junan belulinon.

Li fine atingis ŝin kaj ofendite diris:

“ Kial vi mensogis, pro kio vi trompis min? ”

“ Ne, vi eraras. Vi trompis min, malkonatulo. Se vi amus min, vi neniam ekkurus al alia virino! ”

La viro ekhontis, konfuzo sin turnis kaj foriris laŭ sia vojo.

(Notis kaj esperantigis Oskar Gardi.
Prenita el “ Norda Prismo ” Nr. 1 1962)

ELDONEJO-LIBREJO SONORILO

Blankenbergesteeweg, 72

Brugge

P.C. Nr 1521.40

KOMUNIKO DE LA LIBROSERVO

A. Noveldonaĵoj aŭ aktualajoj

- Perfekteco de la Esperantaj verboj (L. Mimo) 36,—
- Belarto (kajero n° 11) 40,—
- Cent ĝojkantoj 40,—
- Dana antologio (bindita) 150,—
- Elektitaj poemoj (Castro Alvez) 70,—
- La eta princo (de Saint Exupéry) 120,—
- Kredo, Floroj kaj dinamito (biografioj de Sankta Birgitta, Linnaeus kaj Nobel) (bindita) 85,—
- idem (broŝurita) 50,—
- Infanoj ne konas limojn (pli ol cent artfotografajoj de infanoj el la tuta mondo + 30 paĝoj da teksto) 40,—

B. Malnovaj eldonoj

- Nia libroservo ankoraŭ posedas kelkajn verkojn jam elĉerpitaj ĉe la koncernaj eldonistoj, nome:
- Kvaropo (originala poemaro de Auld W. - Dinwoodie - Francis kaj Rossetti) 80,—
- Bapto de caro Vladimir (legendo de la Rusa historio) 80,—
- El la maniko (originala novelaro) 95,—
- Kontralte (originala poemaro) 95,—
- Eseoj I Beletro (originale) 95,—
- La Infana Raso (originala poemaro) 95,—

C. Libroj por infanoj: ĉiuj menciitaj libroj ĉi-sube estas kun belegaj multkoloraj desegnaĵoj kaj la tekstoj estas facilaj.

- Martin Krpan (grandformata albumo) (bindita) 75,—
- Varma rivereto (bindita) 25,—
- Ŝtelita Lampo (grandformata albumo) (bindita) 30,—
- Meĉca Etulino (duonkartona koverto) 15,—
- Kun miaj amikoj la bestoj 11,—
- Kampmuso ekskursas 11,—
- Vespero en la cirko 11,—
- Eta plumba soldato 11,—
- Orharulo kaj Ruĝa Kresto 11,—
- Kaj nun ni eklaboru 11,—
- La ratkaptisto el Hameln 11,—
- Pli kaj pli rapide 11,—
- Aladino kaj la mirinda lampo 11,—
- La kuraĝa tamburisto 11,—
- La kompleta serio de dek verkoj por 100,—

NI GEJUNULOJ

NATAN LA SAĜULA

“Natan la Saĝulo” estas la titolo de *drameca* (1) poemo de la germana verkisto Lessing, kiu vivis en la 18-a jarcento. La Esperanta traduko en versoj estas facile legebla.

La tuta agado *disvolviĝas* (2) en la domo de Natan, en Jerusalemo. Krom Natan, riĉa judo, la *ĉefroluloj* (3) estas: Sultano Saladin, mahometano, kaj juna *Templano* (4), kiu *kompreneble* (5) estas kristano. Ni estas en la tempo de *Krucmilito* (6).

Natan havas *adoptitan* (7) filinon, kies nomo estas Recha. Iam ŝi estis savata de la Templano el granda danĝero. Poste ili *enamiĝas* (8) reciproke kaj deziras geedziĝi. Tiu projekto ricevas la aproban konsenton de la Sultano.

Sed la dramo eksplodas: *eksciinte* (9) tiun projekton, Natan malkaŝas ke la gejunuloj estas gefratoj, ĉar ili estas infanoj de mortinta frato de Sultano Saladin.

Kvankam la ĉefroluloj estas el tri diversaj religioj, la akordo inter ili estis harmonia *dank'al* (10) la saĝeco de Natan, kiu *pledis* (11) por plejble granda toleremo inter homoj de diversaj opinioj.

Ĉu nia ZAMENHOF LA SAĜULO ne donis al ni la plej efikan rimedon por toleremo, t.e. (12) komuna lingvo por homa interkompreniĝo?

- (1) *drameca*: dramatisch — qui a un caractère dramatique
- (2) *disvolviĝi*: zich afspelen — se dérouler
- (3) *ĉefroluloj* (ĉef-rol-uloj): de hoofdrollen — protagonistes, héros
- (4) *Templano*: Tempelier — Templier
- (5) *kompreneble*: natuurlijk — naturellement
- (6) *Krucmilito*: Kruistocht — Croisade
- (7) *adoptita*: aangenomen — adoptive
- (8) *enamiĝi*: liefde opvatten — s'éprendre
- (9) *eksciinte*: vernomen hebbende — ayant appris
- (10) *dank'al*: dank zij — grâce à
- (11) *pledi*: een pleidooi houden — plaider
- (12) t.e. (tio estas): dat wil zeggen — c'est-à-dire

AL LA BARBULOJ

Kun petoleco kaj iometa tradicia nerespektemo, la junuloj tiel nomas la pliaĝulojn.

Hodiaŭ, senpretende kaj respektplene ni turnas nin al niaj “barbuloj” por rememorigi ilin pri danĝero, kiu minacas la movadon.

En la frontartikolo de “Heroldo de Esperanto” (1.4.62) ni povis legi la jenan frazon: “La aĝo meza de anoj de la Brita Esperantista Asocio estas 50-60-jara”.

Ĉu en Belgujo, simila situacio ne ekzistas?

Kiel tuj ebla rimedo, ĉu la propagando ne devus esti direktita unue por interesigi la junularon al la Internacia Lingvo? Ĉu tiucela afiŝeto ne povus esti eldonata okaze de la novaj kursoj de la vintra periodo?

Sed la “senbarbuloj” ankaŭ havas sian respondecon. Krei en ĉiuj urboj junularan rondon, kiel tre lerte faris niaj junaj amikoj et Antverpeno, jen estas aktuala tasko.

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S. P. R. L.

Tel n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj.

TABULO, por lernejtabeloj; KATOKULO, por signalvitroj.

JUNULARA ANGULO

Estas nun decidite ke la 18-a Internacia Junular-Kongreso de TEJO okazos en Ystad, Svedujo, dum la semajno post la Universala Kongreso en Kopenhago, do 11/8 - 18/8 1962. Antaŭe ja estis intenco ke la TEJO-kongreso okazu en Fredrikshavn, sed pro rezigno de la tieaj samideanoj ĝi anstataŭe okazos en Svedujo.

Ystad estas urbo kun proksimume 13000 enloĝantoj en la orienta parto de la plej suda sveda provinco, Skane (Skanio). La urbo situas ĉe la Baltiko kaj havas grandan sablostrandon. Proksime de tiu strando troviĝas la novkonstruata banhotelo, en kiu la kongresanoj loĝos.

Verŝajne la kongreso komenciĝos en iu alia loko kaj la kongresanoj nur dimanĉe alvenos al Ystad. En la programo estos la kutimaj eroj kiel ekz. ekskursoj, interamikiga vespero, diservo, kongresa balo, jarkunveno de TEJO, prelegoj, oratora konkurso kaj sportaj konkursoj.

Pli da detaloj i.a. pri kotizoj kaj aliĝmanieroj aperos en venontaj komunikoj kaj en la invitilo. Se vi deziras ricevi inviton kun aliĝilo, petu ĝin ĉe Bruno Denoël, Liège, Rue V. Raskin.

(Adreso de la kongreso: Esperanto-Kongreso, Ystad, Svedujo.)

La oficialajn komunikojn distribuas: S-ro Börje Andersson, Ingegatan 4, Skövde, Svedujo.)

EN LA ATENEO DE WAREMME

En la ateneo (gimnazio) de Waremmé en la provinco Lieo, Esperanto estas instruata de S-ro profesoro Joachim, kiel libervola kurso.

D-ro P. Denoël, vicprezidanto de Belga Esperanto-Federacio, estis invitata prelegi tie la 10-an de Majo. Cestis du profesoroj kaj 25 lernantoj.

La preleginto montris al la lernantoj kiamaniere Esperanto povas ilin helpi en la lernado de la aliaj kursoj (ĉefe kiel baza lingvo por la studo de fremdaj lingvoj).

Filmeto pri la 44-a U.K. estis poste projekciata.

FEDERACIAJ SCIIGOJ

REZOLUCIO

Estraro kaj administrantaro de la Belga Esperanto Federacio konstatas dum sia kunveno de 26 - 5 - '62

1. ke dum 75 jaroj la esperantistaro perfekte interkompreniĝadis, kvankam iuj havas unu vidpunkton rilate la pasivajn participojn -ata kaj -ita, kaj aliaj havas alian vidpunkton ;

2. ke tiun demandon neniam povos solvi kampanjoj, decidoj kaj rezolucioj, sed nur senpasiaj sciencaj studoj kaj la lingva evoluo mem ; flanken lasante la temon mem, kiu el la du partioj estas prava rilate la partipan demandon, alvokas al ĉiuj seriozaj esperantistoj :

1. ĉesigi ĉiujn publikajn disputojn pri la participa demando ;

2. ĉesi diskuti pri Zamenhof aŭ ne-Zamenhofa lingvouzo, sed amike kunlaboradi laŭ la Zamenhofa spirito ;

3. unuigi ĉiujn siajn fortojn en konstrua laboro por antaŭenigado de la universala Esperanto-movado laŭ la devizo de Universala Esperanto--Asocio " Unueco estas forto ".

Por la B. E. F.

M. JAUMOTTE - G. DEBROUWERE
prezidantoj.

PROPAGANDAJ KOLOR-DIAPOZITIVOJ

Belga Esperanto-Federacio aĉetis en Francujo. — en la kadro de la granda propaganda kampanjo, kiun ĝi intencas iniciati en Septembro antaŭvide al la rekomenciĝo de la kursoj en la diversaj grupoj. — serion de belaj propagandaj diapozitivoj.

Estas serio de kvindek da bildoj, kiuj montras diversajn aspektojn de la esperanta vivo : fotojn de Zamenhof, de gravaj libroj, de universalaj kongresoj, la tekston de la deklaro de UNESKO, ktp.

Aldonante nur kelkajn vortojn pri ĉiu el tiuj ĉi bildoj, oni havas fakte sukcesvekontan paroladon per varbi homojn al nia idealo.

Tiu serio formas, en sia nuna formo jam, kompletan tuton kaj la grupoj povas peti al la ĝenerala sekretario rezervigon por unu semajno dum la postferiaj monatoj. Ili prefere indiku du eblajn datojn, tiel ke, se unu dato jam ne plu konvenus, la alia povu esti certigata.

Eu urboj, kie estas du grupoj, tiuj ĉi interkonsiliĝu, por eviti la kostojn kaj la riskojn de dufoja forsendado.

Nunmomente, S-ro François Schellekens, unu el niaj teknikistoj pri diapozitivoj, prizorgas la kompletigon de la serio per kelkaj pliaj kliŝoj, kiuj akcentas la vivon en nia lando.

Poste, estos ankaŭ petata la helpo de aliaj kunlaborantoj en aliaj urboj.

En sia tuj proksima kunveno, la estraro fiksos la certe malaltan, sed tamen nepre alkalkulotan sumon por momenta cedo kaj forsendo de la pakajeto.

FILM-RUBRIKO

Dum la lastaj monatoj la teknika sekcio de " La Verda Stelo " jam realigis la sinkronizon de 3 kolorigitaj dokumentfilmoj 16 mm. esperante parolataj laŭ la sistemo kiun oni uzis dum la U.E.K. en Bruselo. Ili estas :

1. *Vintra Libertempo en Germanujo* (Wintervacantie in Duitsland) 25 min. mendebla al : Sofedi, Renbaanlaan, 147 Av. de l'Hippodrome. Bruselo 5 almenaŭ 4-5 semajnoj antaŭe. Senpaga; nur la sendkostoj.

2. *Belaj koloroj... bona humoro* (Mooie kleuren... goed gezind — Belles couleurs... bonne humeur) 30 min. mendebla al la sama firmao kiel supre.

3. *Karlo Lineo* (Carolus Lineus) 18 min. mendebla al Ambasadego de Svedujo en Antverpeno. Frankrijklei, 123 4-5 semajnoj antaŭe. Senpaga akirebla en la ambasadejo.

La sonbendoj kun Esperanto-teksto de ĉiuj tiuj filmoj estas akireblaj ĉe J. Verstraeten, St Bernardsesteenweg, 1078, Hoboken.

LA DELEGITECOJ de U.E.A.

Sekve al la kunfandiĝo de la du antaŭaj Ligoj kaj la starigo de B.E.F., la Ligestraro devis antaŭvidi, por proksima jaro, la elekton de nur unu delegito en tiuj urboj, en kiuj ĝis nun ambaŭ Ligoj havis unu.

Post interkonsiliĝo kun la interesotoj kaj en amika kunlaborema sento, troviĝis unu, en ĉiuj tiuj urboj, kiu bonvoleme retiriĝis por iĝi, ĉu vicdelegito, ĉu faka delegito.

Ni kore dankas tiujn, kiuj tiucele forlasas sian delegitecan funkcion, kiun kelkaj plenumis jam dum multaj jaroj : nome S-inon M. Vandeveld (Gento) kaj S-rojn Cortvriendt (Antverpeno), Roose (Bruĝo) kaj Mcoij (Bruselo).

Tie funkcios do estonte kiel delegitoj : S-ino L. Bernaerts (Antverpeno), S-roj Ch. Poupeye (Bruĝo), H. Castel (Bruselo) kaj F-ino J. Terrijn (Gento).

Speciale en la urboj, kie ekzistas du grupoj, tiuj ĉi delegitoj nepre zorgos, ke ambaŭ grupoj estu, — samtempe kaj rapide. — informitaj pri eventualaj vizitoj de eksterlandano, por krei la eblecon, ke la vizitanto estu eventuale akceptita en la grupo, kiu havos kunvenon dum la tempo de lia restado en tiu urbo.



Ora geedziga Jubileo

La 24an de majo, festis sian oran geedzigan jubileon, niaj fidelaj geamikoj G-roj Jan Jacobs, kiuj jam festis ambaŭ sian esperantistan oran jubileon, ĉar ambaŭ jam apartenis al nia movado, je la momento de la geedziĝo.

Ni ne rediros la diversajn funkciojn, kiujn speciale la edzo plenumis en tiu movado, sed ni volas hodiaŭ speciale pensi pri la hejma feliĉo dum tiuj longaj 50 jaroj kaj diri al ambaŭ kiom la multaj membroj de nia Federacio, kiuj ilin konas, enpense kunvivis la agrablan tagon de tiu jubileo.

Ni ne dubas ke la multaj elmontroj de simpatio, kiujn ili ricevis, estis al ili vere bonvenaj. Tial ni ne hezitas aldoni ankoraŭ lastan vorton de gratulo kaj de bondeziro al tiuj jam senditaj al ili.


Ke ili ankoraŭ longe vivu !

Kasistinoj

Dum la administrantara kunsido de sabato la 25a de majo, la kunven-prezidanto komunikis, ke, por la jaro 1963, S-ino R. Van Herck-Huysmans, kiu feliĉe resaniĝis post iom grava malsano tuj post la nasko de filineto, tamen preferas rezigni la kasistinan funkcion, kiun ŝi plenumis tiel akurate por la antaŭa R.B.L.E.

Atendante ke, ĝustatempe, la estraro kaj la ĝenerala kunveno, reguligos la situacion rilate al la kasa fako, ni kore dankas S-inon Van Herck pro la faritaj servoj kaj ni esprimas la esperon ke la honora titolo, kiun ŝi akiros je sia definitiva ekziĝo, ne forlasiĝos al ŝi ĉian laboron en kaj por nia Federacio kaj ke ŝi deziros akcepti ian alian taskon en nia estraro aŭ administrantaro.

Dum la sama kunveno, la kunven-prezidanto komunikis ankaŭ ke, sekve al interkonsento inter F-ino Terryn kaj S-ino Plyson, kiuj ambaŭ, por la du Ligoj, prizorgis la kongresajn kasistecojn, estos tiu ĉi lasta, kiu prizorgos la porkongresajn pagojn por ĉiuj membroj de B.E.F., ne nur por la Beneluksaj sed ankaŭ por la Universalaj Kongresoj.



RABINDRANATH TAGORE. — Malsata ŝtono — El la bengala trad. Lakshimishwar Sinha; ilustris Sukhamov Mitra. Eldona Societo Esperanto, Malmö — 1961 — 128 p. Prezo broŝ. 34 st.; bind. 46 st.

Laŭ la enkonduko de D-ro Lapenna estas la unua kontribuo en Esperanto, responde al Unesko-projekto, celanta reciprokekonekti la orientajn kaj okcidentajn kulturvalorojn. Disponante pri lerta Esperanto-aŭtoro hinda, L. Sinha, disĉiplo de Tagore kaj instruisto en ties lernejo en Santiniketan, estas kompreneble ke oni pensis al la fama Nobelpremiito (1913) kiu mem estis liga elemento inter ambaŭ kulturoj, kaj de kiu cetere oni festis la centjaran datrevenon de la naskiĝo (1961).

Rekte tradukinte el la bengala — avantaĝo por Esperantistoj — s-ano Sinha prezentas el pli ol cent rakontoj, iujn « kiuj donas priskribon de bengalaj karakteroj kaj de naturo kaj de homo ». Ĉar mi mem en 1920 havis okazon aŭskultadi en Antverpeno, kie Tagore havis bonajn amikojn, lian anglalingvan « mesagon de la arbaro », kaj ĉar la respektinda figuro de la profetaspekta Hindu tiel impresis min, ke post tiom da jaroj la rememoro restis viva, mi kun scivola intereso legis la sep rakontojn, kiuj sub la titolo de la unua, honoras la Eldona(n) Societon en Malmö pro la inde zorgita libro, kaj la kapablon de la tradukinto.

La flandra poeto Karel Jonckheere, ĉeestinte en Hindujo, kiel reprezentanto por la nederlanda literaturo, la memorigan jubileon, asertis ke la diferenco inter okcidento kaj oriento estas nur iluzio, kaŭzita de aŭtoroj kiel Kipling kaj serifilmoj kiel « La tigro de Bengalujo », sed ke internaj diferencoj fakte ne ekzistas kaj nur eksteraĵoj povas esti aliaj. Aliflanke la rakontoj estas verkitaj ja en la lasta jardeko de antaŭa jarcento, sed en lando kie ekz. la infanecziĝoj nun empe estas malpermesitaj sed tamen ankoraŭ okazas en la kamparo, la moroj kaj kutimoj kredeble ĝis nun ne tiel revolucie ŝanĝiĝis...

Metite antaŭ nekonataj situacioj, la leganto rigardas tra fremda kadro de kastoj, kredoj, lingvoj, gentoj, religioj kaj superstiĉoj en la vivantan animon de la bengala homo, kvankam fatalista, avida al justeco kontraŭ ofte anonima tiraneco de fremda administracio, sindonema, konsekvenca konsciencia, amema kaj liberama, krom ĵaluzo, malkuraĝo kaj oportunista, same kiel en okcidento... Kaj li ĝuas la prozon de Tagore, kelkfoje trempitan en fabela aŭ sonĝa atmosfero, sed ĝenerale pli klaran ol sugestian, almenaŭ en la traduko. Notoj helpas al bona kompreno de esprimoj, inter kiuj la formo « Kalikato » ŝajnas preferata al « Kalkuto » en vortaro Waringhien, kaj naŭ fremdstilaj desegnaĵoj akcentas la ekzotikecon.

TYN.

PLUK. Miniaturoj de Poul Thorsen. Eldonis Dana Laborista Esperanto-Asocio, Aarhus 1960. 96 p., 10,5×15. Prezo: 36,— b.fr., broŝurita.

Kun rideto sur la lipoj la aŭtoro petolas tra la vivo: ministro aŭ postskribo,

fridujo aŭ demimondanino, amo aŭ dana klimato, ĉio fariĝas preteksto al fajre-ranta humuro kiun li kristaligas en centoj da miniaturaj versaĵoj. Dekstre-maldekstre, laŭhazarde, li plukis siajn spritajn floretojn, foje kaj refoje, kaj ĉiam pli ofte miksanse mokon al ŝerco, dum tie kaj tie satiro akriĝas ĝis sarkasmo.

Ne sen ŝato li moki ridindigas la sciencojn (15) kiu grave okupiĝas pri bagateloj, la internacian juron (31) kiu praktike neniam sekurigas, la statistikojn (11, 20) kiuj celas nur bele kaŝi la realon, la ĵurnalistojn (47,63), tiujn senkompajn mensogulojn. Malicete li konstatas la potencon de la oro: ĉie ĉefas la lingvo dolara (9), kaj pro mono plej altranga knabino edziniĝas al simio (8). Eĉ la esperantistojn li ne indulgas kiam en siaj kluboj ili nacilingve babilas (25), ĉar la ŝajne forta Esperanto facile mortus (27). Fakte, tiu ŝajna forteco estas ne pli ol blufa eufemismo (29). Al la tradicia moralo pri amo li pafas areton da pikaj saĝoj (6). Platona amo? Nura fuŝado (10). Kadukeco pro neceso al virto instigas (50), pro timo singarda la tiklo de erotika parolo sufiĉas (28), sed lia petolemo al amoro sopiras (36,70,80).

Plej seniluziĝe montras sin al li la homo. La homo kiu lanĉas satelitojn, sed ĉu por amo aŭ por militaj teruraĵoj (37)? La homo kiu space veturas al astroj, sed ignoras la vojon al najbaro (83). La homo kiun tiom da kaŭzoj devigas ruĝiĝi pro honto. La homo kiu envere ankoraŭ ne estas la Homo, sed eble mankanta ĉenero en la evoluo de besto al Homo (94).

La moka tono pli kaj pli akriĝas, amariĝas, kiam la aŭtoro provas difini la sencon de la vivo en mondo pri kiu oni dubas, ĉu ĝi kuras al vivo aŭ al likvido (95). La vivo? « Gi multe pli similas — al tiu ĉi infanĉemizo: — mallonga kaj malpura. » (68). La lasta iometo da ŝercemo forsvenas en la senesperiga konstato (23):

« La senco de l'vivo
abunde atestas,
ke nek motivo
nek senco estas. »

Ne mirige, ke ankaŭ novmodaj politikaj sloganoj inspiris duon da epigramoj (33,89). Supozeble la rapida fluo de la nuntempa historio jam instruis la aŭtoron ke rasismo ne estas ekskluziva « privilegio » de blankuloj, ke koloniismo ne estas nur abismo de abomenindaj kruelaĵoj. Revekiginte al pli objektiva prijuĝo, al pli da senparticeco, li sendube konsentos ke:

« Memoras la homoj nur pri la malbono,
Sendanko regadas la mondon.
Ofendo profunde ĉizigas en ŝtono.
— Bonfaro skribiĝas sur l' ondon. »

Kiel foje skribis la franco Bertaut. (1552-1611).

Kvankam kelkaj poemetoj ne sin distingas per klareco kaj komprenebleco eĉ post atenta esploro, la leganto plaĉe gustumos la mildan humuron, la pikan spriton, eĉ la amaran mokon, laŭdinde densigitajn kun okazaj vortludoj en konciza, facilflua kaj belsona formo. Ni volonte konfesos: kiel humoristo kaj satiristo, la aŭtoro certe ne estas senmerita.

Preso zorgita, papero kaj prezento plaĉaj.

F. COUWENBERG.

LANTI PRI SENNACIISMO. Deksespaĝa broŝuro eldonita de SAT. Gi estas kompilaĵo de diversaj tekstoj de Lanti pri lia plej kara temo. Tiuj, kiuj jam konas lian verkon, trovos do en tiu broŝuro nenion novan. Sed ĉiuj aliaj — tiom la aprobantoj kiom la neaprobantoj — post la legado supozeble deziros pli funde koni la ideojn de iu el la plej indaj esperantistoj, ne nur pri tiu temo, sed ankaŭ pri la aliaj aspektoj de lia pensado. Kiel ĉiam bone presita.

C. ROGISTER.

LA RECENZITAJ LIBROJ ESTAS HAVEBLAJ ĈE LA LIBREJO
SONORILLO (SHE ISERENTANT R.) BLANKENBERGESTEEN-
WEG 72 BRUGGE, P.K. 152140

GRUPA VIVADO

NEKROLOGO

Dum vizito al granda magazeno, subite mortis en Bruselo unu el niaj plej malnovaj kaj samtempe plej sindonemaj samideaninoj F-ino Simone Obozinski, honora vicprezidantino de nia ĉefurba sekcio: Brusela Grupo Esperantista, kiun titolo ŝi akiris dum la lastjara festeno, dum kiu ŝin speciale honorigis la grupa prezidanto kaj la prezidanto de la tiama R.B.L.E.

F-ino Obozinski estis esperantistino de antaŭ pli ol 50 jaroj. Ŝi estis laŭvice kaj ree bibliotekistino, help-kasistino, sekretariino kaj vicprezidantino de la Grupo kaj komitatanino kaj komisarino de la Ligo.

Dum 18 jaroj, ŝi gvidis kursojn en la ĉefurbo kaj ŝi sin krome dediĉis al la propagando, en la lando mem, kie ŝi venigis multajn novulojn al nia movado, kaj ankaŭ eksterlande, en la kadro de Intern. Ligo de Esper. Instruistoj.

Ŝi versaĵe estis, en nia lando, la plej regula ĉeestintino de belgaj, beneluksaj kaj universalaj kongresoj.

Ŝi krome estis plej afabla kunlaborantino, kiu, plej laste, sin plene dediĉis al la preparo de la 45a U.K. en Bruselo.

Ĉar ŝi homaranisme oferis sian korpon al Universitato por sciencaj celoj kaj do ne havas tombon, kiun la esperantistoj povus lastfoje viziti, la Brusela Grupo Esperantista decidis organizi la 4an de junio memoran vesperon, honore al ŝi kaj dum kiu diversaj samideanoj memorigis la plej gravajn meritojn de la kara foririnto.

La estraro kaj administrantaro de Belga Esperanto-Federacio emociplene adiaŭas sian karan kunlaborintinon.

La Grupo de Bruselo krome pridedicis starigon de « Fandajo Simone Obozinski » por helpi laŭeble la movadon en Oriento, pli speciale en Hindujo, kie, — kiel multaj scias —, ŝin dediĉas nunmomente S-ino Haudebinne, la konata profesorino, kiu, antaŭ la dua mondmilito, dum iom longa tempo tiel aktive laboris en nia lando, kie ŝi organizis multajn kursojn.

Tiuj, kiuj deziras per donaceto kontribui al tiu Fandajo, ĝiru do sumeton al P.C.K. N° 12.30.48 de « Esperantista Brusela Grupo », kun mencio « Fandajo Obozinski ».

MEMORA VESPERO HONORE AL FRAŬLINO SIMONE OBOZINSKI

Ne havinte la konsolon adiaŭi ĉe la tombo Fraŭlinon Obozinski — ĉar ŝi oferis sian korpon al Universitato pro scienca celo kaj pro ĝisfina homaranismo — ni honorigis ŝian memoron dum speciala vespero dediĉita al niaj kuntravivaĵoj dum ŝia esperantista vivo.

Ni kunmetis jenan programon:

- 1e — S-ro Jacobs: Omaĝo al Fraŭlino Obozinski
- 2e — Peer Gynt: « Ase's Death » (disko)
- 3e — S-ino Plyson: Kongresaj kuntravivaĵoj
- 4e — F-ino Obozinski: « Kiamaniere mi esperantiĝis » (sonbendo)
- 5e — S-ino Staes: Rememoraĵoj pri la U.K. de Varsovio en 1937
- 6e — Peer Gynt: « Ase's Death », dua parto (disko)
- 7e — S-ro Castel: Fraŭlino Obozinski kiel aktorino
- 8e — D-ro Kempeneers: Antaŭmilitaj Belgaj Kongresoj (filmoj)
- 9e — « Le spero »

Jean OLEFFE,
Kasisto

Maurice NANQUETTE,
Sekretario

René JACOBS,
Prezidanto

NEKROLOGO

En decembro 1961a mortis en Verviers inĝeniero Camille Rogister, 72-jara. Li naskiĝis en tiu urbo, sed poste forlasis ĝin por vivi dum multaj jaroj en Francujo kaj en Svislando. En Genevo li dum pluraj jaroj laboris ĉe la CO de UEA. Li aktive kunlaboris al esperantlingvaj fakterminaroj. En 1960a li ankoraŭ partoprenis la UK-on en Bruselo.

La 16-7-1962 forpasis S-ano Pol SAMYN, el Roeselare sindoninta esperantisto, 54 jaroj aĝa, li estis kun ni dum multaj postmilitaj Kongresoj de FLLE.

Ni kore kondolencas lian patrinon.

La 13-an de Marto forpasis, kelkajn tagojn post grava operacio, nia bona amiko Jean Noez, 56-jara, lernejestro en Tilleur, apud Lieĝo. De du jaroj esperantisto, Jean Noez estis entuziasma samideano, kiu ne timis kiel kursano ĉeesti la Kongreson de Namuro. Nia grupo ege bedaŭras tiun perdon. Nia komitatano Jean Pirard reprezentis la grupon dum la funebra ceremonio kiu estis vere impona.

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo « La Verda Stelo »

Postĉeknumero: 726.54

La 2an de marto S-ro Luc De Marré prezidis la kunsidon kies temo « Parolata Jurnalado » denove ebligis al diversaj gemembroj montri siajn literaturajn talentojn: F-ino H. Hofkens pritraktis la vestajn modojn tra la mondo eĉ ĝis en Japanujo; belaj lumbildoj ilustris tiujn klarigojn. S-ro H. Vermuyten klarigis la tradukon pri flandra vorto kiu kaŭzis malfacilaĵon dum la antaŭa kunsido. S-ino R. Lecat prelegis leteron kiu ricevis de korespondantino el Hispanujo. S-ro J. Verstraeten antaŭlegis artikolon el « Heroldo » kaj por konkludi S-ro Luc De Marré prelegis kelkajn historiojn i.a. « La Japana ŝtonhakisto » de Multatuli.

La 9an S-ro R. Van Eynde paroladis pri « Aspektoj de la ekonomio en nia lando » en kiu li pritraktis diversajn aktualaĵojn kaj problemojn en la industria aŭ komerca mondo. Li faris tion laŭ vera « specialista » maniero, citante cent kaj unu detalojn kiuj pruvas lian veran « ĝisfundan » konon de tiuj temoj.

Dimanĉon, la 11an — posttagmeze — okazis vizito al la tunel-instalaĵoj, gvidata de S-ro R. Van Eynde. Estis tre interesa rondirado eĉ ĝis en la tunelo kaj la 30 verdstelanoj konkludis tiun agrablan posttagmezon en la kafejo de la Internacia Marista Domo.

La 16an S-ro R. Jaumotte prezentis sian jam tradician kulturalan distran vesperon. La enhavo estis — kiel ĉiam — tiel diversa kiel interesplena kaj la tuto bone prizorgita.

La 23an post trafa kaj tre amika enkonduko pri la paroladisto fare de la Prez. S-ro M. Jaumotte, S-ro Aug. Facs paroladis pri « Printempa Atmosfero ». Muzika temo kiun li substrekis ĉefparte per aŭdigado de gramofondiskoj el la verkaro de F. Mendelssohn kaj Robert Schumann. Li skizis la ekston de tiuj tre romantikaj verkoj — kreitaj de la aŭtoroj post emociplenaj periodoj en ilia vivo — kaj atentigis pri diversaj specialaj eroj kaj nuancoj en la ĝis nun ankoraŭ ĉiam ŝatataj majstroverkoj. Varma aplaŭdo kaj dankaj vortoj de la Prez. konkludis tiun belan paroladon.

La 30an S-ro R. Van Eynde denove prizorgis la dokumentan filmvesperon kiu staris en la signo de Svedujo. 3 Filmoj estis prezentataj pri tiu bela lando. Unu el ili, Carolus Lineus, skizas la vivon de tiu mondfama botanikisto. Tiu belega kolorfilmo estas esperantigita de la teknika sekcio de la grupo: F-ino Bl. Geers (tradukis el la franca), S-ro Ivo Durwael (kiu parolas la filmon) kaj S-roj Maur. Jaumotte, J. Montmirail, R. Van Eynde kaj J. Verstraeten.

La 6an de aprilo en la jam tradicia « Ĉirkaŭ la Fajro » diversaj gemembroj kunlaboris al la kreado de vera « homa sfero en la dunolumo apud bonega fajro kaj bongusta trinkaĵo en agrabla loĝĉambro ». Pri tiu realigo respondicis: F-ino Cl. Peeters, F-ino H. Hofkens, S-ino Math. Lemmens (kies kontribuo estis ege ŝatata de la ĉeestantoj), S-ino E. Riadis (denove pri Grekujo per bonega elparolado!), S-roj H. De Roover, E. Claes (pri la granda hejma purigado per ĉiam pli kaj pli boniganta lingvo!) kaj R. Van Eynde (jam parte klarigante nian ekskurson al Huy).

La 13an de aprilo, pro malsano de aktorino, la radiofona kaj bilda teatraĵo ne povis okazi, sed Prof. Nišiumi, japana samideano, vizitis la grupon kaj paroladis pri sia bela lando, montrante dekojn da kolorigitaj diapozitivoj.

La 20an, diversaj membroj kreis la Sanktan Vendredan atmosferon. S-ro H. Vermuyten revokis antaŭ niaj okuloj la proceson de Jesuo; F-ino Math. Hofkens antaŭlegis fabelon kaj S-ro Luc De Marré pritraktis paskajn kutimojn. F-ino L. De Winter, S-ino R. Lecat kaj S-ro R. Van Eynde kompletigis la vesperon per gajaj kaj instruigaj kontribuoj.

La 27an, S-ro Luc De Marré preparolis libron « Fraŭ Sixta », laŭ kies enhavo filmo estas farita kaj kiun li enkondukis antaŭ ol S-ro R. Van Eynde ĝin prezentis. Drama filmo kiu forte emociigis la ĉeestantojn.

Dimanĉon, la 29an, 40 verdstelanoj aŭtoĉare ekskursis al Huy kaj Val St Lambert. S-ro R. Van Eynde ilin gvidis kaj klarigis multajn specifajn detalojn, i.a. la vizitojn al la groto de Ramioul kaj al la kristalfabriko de Val St Lambert. Lieĝaj samideanoj, — D-ro Denoël kaj familianoj, — akompanis la ekskursantojn ĝis en Lieĝo, kie oni konkludis la tagon per agrabla komuna manĝo.

La 4an de majo, S-ro R. Van Eynde denove prezentis dokumentajn filmojn kolorigitajn, inter kiuj unu Esperante parolata: 24 horoj en Stokholmo. Krom S-ro Van Eynde kunlaboris al tiu efektiviĝo: S-roj L. De Marré, J. Montmirail kaj J. Verstraeten.

La 11an, la ĉeestantoj estis agrable surprizataj pro la « Finna Saŭno » t.e. la famaj Finnaj varmegaj ŝvitbanoj. La paroladisto, S-ro H. De Roover, kiel spertulo kaj praktikanto, pere de lumbildoj, entuziasme pritraktis tiun temon kaj lia teksto multege plaĉis al la aŭdantaro, kiu streĉe aŭskultis la klarigojn. S-ro Jan Jacobs, aldonis specifajn detalojn pri tiu lando.

La 18an, per kolorigitaj diverstemaj diapozitivoj, muzika sonbendo kaj deklamado de prozo kaj poezio, ĉio en la signo de « la printempo » kaj « la bela monato de majo », S-ro Fr. Schellekens prezentis sian parolatan journalon laŭ sia propra stilo, t.e.: kulturaspakta, humorplena kaj (el fotografia vidpunkto) vere arta maniero.

Jaŭdon, la 24an, proksimume 25 verdstelanoj kuniĝis en la norvega restoracio « Norge » en la Meirplaco por altabliĝi kaj ĝui la « menuon senfinan » laŭ la skandinava maniero. En amika kaj « batalema » (je manĝaĵa vidpunkto) sfero, oni travivis kelkajn agrablajn horojn ĉirkaŭ granda festa tablo ornamita per Esperanto-flago.

La 25an, la antaŭvidita kultura distra vespero de S-ro R. Jaumotte estis prokrastita kaj anstataŭigita per « Ĉirkaŭ la Fajro », al kiu donis sian kunlaboron: F-ino Math. Hofkens (per ŝercaĵoj) S-inoj Fr. De Roover (pri vojaĝo tra Italujo/Svisujo), S-ino E. Riadis (pri Delfi en Grekujo) kaj S-ro H. De Roover (pri la problemoj de la « nozemoj »).

La JAS-anoj (JAS = Junulara Antverpena Sekcio) kunvenis jam diversfoje. La kunvenoj estas miksaĵo de paroladetoj pri Esperantaj aferoj kaj amuzo.

La esperantistoj havas la okazon — en gaja atmosfero — paroli tie nian lingvon. Kaj la novaj simpatiantoj, pere de grupaj ludoj, aŭskulto, kantoj k.t.p. iom post iom alkitimigas al Esperanto. Krom tio, ĉiuj promesis sekvi la sekvontan elementan kurson.

Kunvenoj okazos i.a. ĉe S-ro Guido De Raedt, Waterbaan, 27, Deurne, kie ĉiuj estas bonvenaj.

Pronaskiĝaj gratuloj

La 27an de marto pligrandiĝis la famileto de nia sekretario franclingva kaj de grafino Georges de Cuyper per la naskiĝo de fileto Guy.

Ni kore gratulas nian amikon, lian ĉarman edzinon, ankaŭ la filinon Danielle, kies naskiĝo, iom post la U.K. en Bruselo, ne estis tie ĉi menciita, sed kiun ni, kun ŝia frateto, kore bonvenigas en niajn rangojn, kiel denaskiĝajn membrojn!

Esperantista Brusela Grupo

Koncize, la kroniketo de la grupo aspektas jene por la ĵus pasintaj monatoj : En oktobro 1961 okazis la 2an: Parolata ĵurnalo. La laŭreatoj estis, en kategorio A: Sro van der Stempel, en kategorio B: Fino Opsomer; la 9an perfektiga kurso gvidata de Sro van der Stempel. La leciono pritraktis ĉefe la subjunktivan modon; la 16an, nia japana samideano Sro Yutaka Waseda, prezentis lumbildojn pri sia hejma urbo « Nagoya »; la 23an: amuza vespero gvidita de Sino Arnold kiu ege amuzis kaj amuzigis pere de demandoj pri ĝeneralaj sciadoj kaj la 30an: debat-vespero fare de Sro Jacobs, pri la aktuala temo « Kosma Veturado ».

En novembro okazis la 6an: la parolata ĵurnalo. (akiris la plej multe da poĉtoĵoj, en la kategorio A: samegalpoente Fino Obozinski kaj Sro van der Stempel; en B: Sino Isaacson); la 13an Sonbenda reaŭskultado. « Kiamaniere mi fariĝis Esperantisto »; la 19an Jara festeno honore al Fino Obozinski kaj Sino van der Stempel; la 20an: perfektiga kurso farita de Sro van der Stempel « Slosilvortoj kaj Korelativoj » kaj la 27an: prezentado de unuakta komedio de Karl Minor, arango kaj reĝio de Sro Oleffe, Aktoroj: Sro Oleffe, Sino Arnold, Sro Jacobs, Sro Castel kaj Sino Jacobs.

En decembro sekvis la 4an: Parolata ĵurnalo, la gajnintoj estis en kategorio A: Sro Castel; en kategorio B: Fino Opsomer; la 11an: parolado de Sro Nanquette, pri la moderna komunikilo, « La Telekso », kaj la 18an Zamenhofa festo, kun la kunlaboro de nia jam famkonata samideana verkisto Sro A. Samyn, kiu tutspeciala verkis por tiu vespero, « La Poezia Inspiro ».

Dum la nuna jaro, Januaro alportis al ni: la 8an parolata ĵurnalo: gajnintoj A: Sro van der Stempel, B: Fino Isaacson; la 15an Sro Leon De Bruyne paroladis ege favore al Esperanto; traktata titolo « Esperanto kaj Unesko Statistiko »; la 22an perfektiga kurso de Sro van der Stempel, li nin instruis la ŝlosilvortojn, la 29an Ĝenerala jarkunsido kaj elektoj de la novaj komitatanoj, kaj en februaro la 5an parolata ĵurnalo, la laŭreatoj estis en kategorio A: Sino Staes Elly kaj en kategorio B: Fino Isaacson; la 21an kolbasa kirmeso; la 19an perfektiga kurso fare de Sro van der Stempel, kaj la 26an Mitulvespero.

KARLOREGO

Karlorega Grupo Esperantista.

Dum la lastaj monatoj ĉiuj kunvenoj estis agrabligitaj ĉu per esperantaj sonbendoj, ĉu per lumbildoj kun komentoj.

Ni devas speciale mencii tiujn:

— de la 10a kaj 24a de Aprilo, dum kiuj Sro Delforge prelegis pri la fuzraketoj. Lerte kaj klare li pritraktis la temon kaj plezure la ĉeestantoj sciigis ke baldaŭ ili povos ankoraŭ aŭskulti la parolinton.

— De la 1a de Aprilo dum kiu ni notis la ĉeeston de hungara samideano.

— de la 22a de Majo, dum kiu Sro Paulus projekciis kolorigitajn diapozitivojn pri « Neĝulino » speciale por 4 knabinoj. Oni provis tiamaniere ĉu oni povus kapti la intereson de infanoj pri Esperanto.

Malgraŭ la proksima libertempo, la venontaj programoj estas sufiĉe plenaj: krom la antaŭviditaj paroladoj, ni intencas en Junio projekcii kaj komenti diversajn interesajn lumbildojn i.a. pri « La Kastelo de Grésillon », pri « Hungarujo » kaj pri « Esperanto ».

Post ses monatoj da foresto, nia Sekretariino Fino Orsolini je nia granda plezuro, denove funkcios.

Kunvenoj de la Grupo:

Ĉiusemajne mardon 7a.30 — unufoje en la Urbdomo de Charleroi unufoje en Marchienne en la Grupejo.

SE VI PAROLAS PRI STROVI... VI PENSAS PRI
VIANĉAJĜEJO. SE VI PENSAS PRI VIANĉAJĜEJO... VI
AĉETAS ĉE

STROVI

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj:

GARANTIO pri

bona kvalito

kaj bona prizorgado

Telefono: pogranda komerco 34559

detala " 33408

STROVI estas unuaranga!



- ★ POR VIAJ EKSTERLANDAJ
TRANSPAGOJ
- ★ POR ŜANĜOJ EN LA PLEJ ALTA
KURZO
- ★ POR VOJAĜDEVIZOJ

Bank van Roeselare & Westvlaanderen

Sidejo: ROESELARE

Noordstraat, 38 Belgujo

38 Agentejoj kaj oficejoj en la tuta provinco de Okcidentflandrujo.

manufakturaĵo firma DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54



VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



PRECIPAJ CENTROJ:

| | |
|------------|-------------------------|
| Antwerpen | : Aalmoezenierstr. 2 |
| | Abdijsstr. 57 |
| | Anselmostr. 17 |
| | Nationalestr. 87 |
| Arlon | : Marché-aux-Légumes 16 |
| Brugge | : Breidelstr. 8 |
| Brussel | : Galerie d'Ixelles 9 |
| | Anspachlaan 194 |
| Eupen | : Kirchstr. 14 |
| Gent | : Brabantdam 25 |
| Herstal | : Rue Large Voie 4 |
| Leuven | : Bondgenotenlaan 29 |
| Luxembourg | : Place de la Gare 67 |
| Mechelen | : Grootbrug 8 |
| Roeselare | : Ooststr. 124 |
| Tournai | : Rue Royale 75 |
| Turnhout | : Herentalsstr. 6 |
| Verviers | : Pont St. Laurent 2 |